



Registered at G.P.O. Melbourne, for transmission by post as newspaper.



LaSuda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 144 (13th Year), Melburno (Melbourne), Aŭstralio. 10 Aŭgusto, 1932.

SPECIALA VARBNUMERO

WHY ESPERANTO SHOULD APPEAL TO WOMEN.

From early times, thinking men and women, conscious of the impossibility of learning all languages or even the chief of them, have occupied themselves with the problem of an international auxiliary tongue. On 15th Dec., 1859, there was born in a little Polish village Lazarus Ludovic Zamenhof, 'destined to be the author of a system which to date has adherents in all civilised countries of the world and bids fair to gain recognition as the world's official "help-language." Over 4000 books form its growing literature, "consuls" are found in 1800 towns throughout the world, and trade, radio and education are daily recognising in Esperanto a power in the affairs of men.

Esperanto is many times easier to acquire than any national language. A daily half-hour, spent in conscientious study, should enable the student in three months to read and write the language fluently enough to correspond with the four corners of the earth. By the end of the year she should be able to speak it and enjoy its literature.

Women form a large proportion of the world's Esperantists. Some of its chief propagandists and organisers are women. The clubs throughout the globe are half feminine. How many of you have availed yourselves of this wonderful medium for international communication? How many of you are still ignorant of the infinite wealth of foreign friendships and cultural broadening Esperanto holds for those who use it?

You that are fortunate enough to

travel the backwaters of old Europe, far from the well-worn tourist tracks, can you enter into the intimate life of the Bulgarian peasant, the French provincial shop-keeper, the boatman on the Norwegian fjord? Esperanto, the Latin of Democracy, while sponsored by some of the greatest intellects, yet finds thousands of adepts among the simple folk, the countryman and the artisan. While English may serve in a stereotyped way, on the beaten paths of world travel, only Esperanto gives one entry into the true life of a people.

Those who cannot go abroad can exchange ideas by post with thousands of Esperantists in other countries. This should specially appeal to the collectors and to those with special interests and hobbies.

There is much in Esperanto literature to attract the Australian woman. Selma Lagerlof, Sweden's foremost authoress, and Nobel Prizewinner, has already seen one of her books appear in Esperanto and has consented to the publication of all her work in that language. The thrilling travel story, "Through Wild Kamchatka," printed in twelve tongues, has just been published in Esperanto. It tells of the adventures of Mr. and Mrs. Sten Bergman, Swedish scientists, in a remote icebound quarter of the globe. Miss Lilian Pyke's "A Wife by Proxy," a book well-known to Australian readers, was in 1930 published in Esperanto by a Cologne firm. One of the most touching stories of the degeneration of a good woman under the weight of evil circumstance is provided by Zamenhof's translation from the Polish

of the work "Marta," a figure to be compared only with Fantine, in "Les Misérables." To appreciate this work alone, unobtainable in English, surely repays for the time spent in mastering Esperanto.

Let me now touch on Esperanto in the service of Peace Movement. Women play a conspicuous part in the world peace crusade. What an advance would be made on this front if the delegates of the various conferences held to promote the cause were able to understand one another without the unsatisfactory and time-wasting machinery of translation and interpreting! Some of the noblest-spirited women have seen their work weakened or frustrated by inability to express themselves freely owing to the language difficulty. But the Peace organisations are bestirring themselves in this direction; and the time is not far distant, we hope, when the auxiliary language, Esperanto, shall be regarded as official in all such deliberations. When such is true the words "international understanding," to many of us flat and empty, will be invested with meaning and reality.

A language that for 23 years has brought the peoples of 40 nations to an International Congress characterised by the harmonious relation that comes from the unfettered interchange of thought and sentiment is surely worth the world's attention.

It has survived the shock of universal war; it is spreading despite the present unprecedented economic crisis; it lives on the lips of the most widely diverse races. Thus it has proved permanent, the possessor of enduring vitality, and has no fear of being displaced by other systems or of falling into dialect.

True, the modest little Polish oculist, Dr. Zamenhof, its author, although he lived to see his life work established and expanding, did not have the joy of final victory. In 1914 the war shocked rudely his dream of brotherhood and love among the peoples. In Warsaw, under the German occupation, something broke in Zamenhof's heart. He was weak and sick, and intense disappointment weighed him down. Seeing death in front, he yet feverishly labored to effectualise the idea of true fraternity, but he knew peace no more, dying on 14th April, 1917, aged 57.

Only some Polish friends and his humble clients of the poor Hebrew quarter could say good-bye in the name of the universal body of Esperantists, for all the frontiers were closed. "He never sinned," whispered his old servant, intoxicated with love and admiration. Such was the death of one whom to know was to love, and several Australians knew him. Apart from his main labor in composing his language he bequeathed to the world masterly translations from a dozen tongues, including the whole Hebrew Bible.

Some may ask, How can one find Esperantists when one travels abroad? True, they are not yet as thick as peas, and found on every street. You join the Universal Esperanto Association, headquarters in Geneva, for 5/-. You thus get its year book, in which you find thousands of addresses from all parts of the world, and simply use it! You inform by card the "delegate" or "consul" of the town or village you intend to visit. He meets you and helps you in every way possible.

Some time ago, two New Zealanders, wishful of seeing the lesser known parts of Europe, set out from Greece to go through the Balkans north. They spoke only English and French. It so happened that they arrived by train in a Balkan village only to be arrested as spies by the Turks, then at war with the Bulgars. Impotence before the language barrier led them to be confined in a Turkish prison some time before the matter was satisfactorily cleaned up. Had they known Esperanto, and had their year book with them, they need only have pointed out the address of the nearest "delegate" and a most unhappy and even dangerous situation could have been avoided.

Any who are willing to learn Esperanto should get in touch with Box 731F, P.O., Elizabeth-st., Melbourne, for particulars and list of textbooks.

(Broadcasted from 3DB, Melbourne, on Wednesday, 29th June.)

NIA POŬTO.

Bobo. La letero de Zamenhof (n-ro 143) estis kopiita laŭ la plej ekstremaj detaletoj. En la teksto de "La Movado" estas foje majuskloj (grandaj komencliteroj), foje minuskloj (malgrandaj) por la monatnomoj. F.S.P.-P.E. signifas "Franca Societo por la

Propagando de Esperanto."

Reg. C. en R. demandas, "ĉu la vorto "klaso," kiu aperis en la Kroniko, n-ro 143, estas tute ĝusta? Kial ne "kurso"? Mi opinias, ke "kurso" rilatas al soci-orĉo." Respondo: Laŭ la Plena Vortaro la vorto "klaso" havas kvar signifnuancojn, inter ili estas "aro el ĉiuj lernantoj, kiuj sekvas iun gradon de studkurso." En la fama "Letero al Borovko" (Zamenhof, tradukita V. Gernet) troviĝas "kiam, estante en la 5-a klaso de gimnazio..." Millidge ne donas la sociologian difinon, kiun la Plena Vortaro tamen metas unua. Tial, ni ambaŭ estas pravaj. Dankon pro via gratulo kaj konstanta intereso!

THE 1932 "B.E.S. ADRESARO" Just Arrived!

For one shilling may be had from Box 731F the above excellent vademecum of the "korespondemulo"-Esperantist. Apply early as there has been sent only a very small number of them.

This 10th edition is not only a mine of ordered information about the Movement, but provides interesting reading matter in the form of a well written foreword and history, and a valuable "dictionary" of useful abbreviations. Get the B.E.S. (Bohema Esp. Servo) Adresaro now!

FOTOGRAFISTOJ!

Ĉiulandaj profesiuloj, amatoroj kaj interŝanĝantoj de fotoj estas insiste petataj registriĝi plej baldaŭ ĉe la subskribinto. Celata estas: Eldono de adresaro, starigo de internacia organizo, kreo de fotografa terminaro, eldono de foto-revuo. Włodzimierz Pfeiffer, Delegito de U.E.A., Ksiagarnia Fiszerka, Łódź, Pollando.

KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA.

Fondita en 1911 en Antverpeno ĉi ligo celas disvastigi Esp-on en evangelikristanajn rondojn. Lastatempe ĝi faras sukcesan agadon recipie inter la nederlandaj protestantaj Esp-istoj. La kresko de la anaro dum la lasta jaro preskaŭ ebligas revivigon de la iam konata ligorgano "Dia Regno." Paul Hubner, Polkenstrasse 4, Quedlinburg, Germanujo, urĝe petas ĉian evangelian Esp-iston aliĝi al la Ligo. Jarkotizo estas minimume nur 4 resp-kuponoj. Petu la "Informilon"!

TO OUR SUPPORTERS.

We draw attention to a new departure inaugurated with this number. Until further notice a blue cross will appear on the wrapper of all those whose subscription has recently lapsed, that is, within the last two months. A red cross will be placed on the wrappers of all those whose subscriptions have been overdue for some time longer than that. Now, it so happens that a reader may owe for, say, three years and then send us nine shillings. This, of course, leaves him lapsed still a year. In order to give an accurate reflection of the state of things and facilitate the system, we have decided to include his wrapper in the red-marked ones. We trust that this means of reducing postal charges and of promptly informing subscribers of expiration will be satisfactory to all.

Received with thanks:—Miss L. Irwin, 4/6, June, '33; Miss C. Hannaford, 5/-, July, '32; Mrs. Purnell, 5/-, June, '33 (and gift 5/-); Mr. Guilbert, 4/6, June, '33; Rev. A. Lambton, 4/6, July, '33; Miss Ryan, 4/6, June, '33 (and 6d. gift); Yuzo Hasegawa (per Miss Ryan), 5/-, July, '33; Miss Hopson, 4/6, June, '33; Mr. H. Love, 4/6, June, '33; Mr. Cox (sales) 1/-; Hobart Club (per Messrs. Guilbert and Simmons), 13/-; Miss L. Saw, 4/6, July, '33; Mr. F. McArdle, 2/6, Feb., '30; Mrs. A. Heintze, 4/6, Jan., '33; Mr. J. Hodges, 5/-, June, '33; Mr. Dandridge, 2/3, Dec., '32; Mr. Hayes-Williams, 5/-, June, '33; Mrs. McCabe, 4/6, June, '33; Herr R. Strauss, 4/1, Dec., '32; adv., 2/-; Miss E. Chisholm, 5/-, May, '33; Mr. J. Girdwood, 4/6, June, '33; Mr. H. Franks, 10/6, Jan., '33; sales (Messrs. Holloway, Cox), 9d.—Total: £5/16/7.

GERMANLINGVANOJ!

Mi deziras plumamikon, kiu konsentus preni sur sin la taskon traduki mal-longajn artikolojn, kaj frazgrupojn, pri Esperanto el la germana en Esperanton. Reciproke mi same farus el la angla en E-ton por li. Celante tre-precizecon en tiu laboro, mi petas, ke bonvolu respondi nur tiuj serioze studentaj kaj la patran lingvon kaj Esp-on.

Germanĝlo, ĉe "La Suda Krucio," Box 731F., P.O., Elizabeth-str., Melbourne.

"LA SUDA KRUCO"

fermis la jarkonton (Junio 1931-32) kun kelkŝilinga surpluso. Tio montriĝis ebla nur pro la jenaj konsideroj: (1) Vendo de jarkolektoj, (2) Donacoj de monsumoj, (3) Reklamoj, kaj (4) Neapero de n-roj por Septembro, 1931 and Junio, 1932. Malgraŭ tio, ke 20 novaj aliĝis la abonliston, la efektiva abonforto bedaŭrinde malpliĝis, kelkaj eĉ fervoraj amikoj de la gazeto esprimis letere sian nepran devigatecon ĉesi perpoŝan subtenon. Sed la espero devenas de eterna fonto. Pli bonan jaron 1932-33! Ne lasu forvaporiĝi la kuraĝon!

ERARO:

Paĝo 366, kol. 2, linio 31: "supra" (legu: supera).

"ORA MASKO"

Vol. unu.

De Rampo Edogaŭa, tradukita
J. Ŝimomura.

Eldonita de la Japana Esperanto
Asocio, Tokio.

Paĝoj 110; prezo ne indikita.

Estas ne facila tasko doni kontentigan taksjuĝon de libro, pri kiu la recenzanto scias nur enhavon de la unua volumo. Se ĉi volumo entenas duonon, oni rajtas plendi je tio, ke la eldonistoj ne aperigis tian nelongan verkon sub unu kovrilo.

La fi-farojn de la Ora Masko (efektive: Arsene Lupin!), fantomeca krimulo, la japana publiko poparte legadis en tokia taggazeto "King." Kun iom novece stranga sento la eŭropano sorbos tiun tipan felietonon de por li tre fremdmora popolo. Sed Kogoro Akeĉi okupas rolon familieran jam al milmiloj da anglaj kaj francaj legantoj de la Sherlock Holmes kaj Arsene Lupin rakontaroj—tiun de la amatora detektivo "enŝovanta la nazon" ne plaĉe al la oficialaj krimul-serĉistoj. Bedaŭrinde por la hardita legulo de pri-krimaj fikciaĵoj, Akeĉi faras malmulton eksterordinaran en la unua volumo. Espereble li pli originale agados en la sekvonta.

Ni salutas ĉi tiun manifestadon de kreskanta literatura produkemo ĉe niaj ekstrema-orientaj samideistoj, sed, verdire, pli serioza romano pli ĝojigus nin ol ĉi iom krudefekta gazetaĵo. Ĉu ne estas disponeblaj por la E-ta tradukemulo en Japanujo imago-verkoj rakontaj, jam akirintaj rajtan laŭdon

ĉe literaturaj rondoj? En antaŭparolo diras la verkinto: "La japanaj kriminalaj rakontoj ne estas sole tiaj, kia estas 'Ora Masko,'... Ĝenerale ili estas pli bontonaj kaj intelektaj. 'Ora Masko' estis verkita por la gazeto 'King,' havanta pli ol milionon da legantoj; sekve, bonvolu memori, ke mi ĉefe celis, ke ĝi estu amuziĝe komprenata de ĉiuj junaj kaj maljunaj...de ĝenerala popolo." Tio ne estas trea komplimento al la Esp-istaro, sed eble klarigas la trivialecon de la enhavo.

La bindo krep-ora kaj la sola ilustraĵo bone konformas al la spirito de la teksto. Per kelkaj siaj karakterizoj la tradukaĵo sin montras esti provo de homo verkanta en lingvo, kies sintakso estas supozeble forte diferenca de tiu de la gepatra. Sed la okaza uzo de Zamenhofa esprimo promesas disvolviĝon ĉe s-ro Ŝimomura de pli internacia stilo. Neĝusta (ne)uzo de la artikolo; iii, "tio devus kaŭzi" (tio tre povas kaŭzi, A. that may well cause); 9/5, "kiam ankoraŭ sciivoluloj ne amasiĝis" (kiam s. jam ne amasiĝis); 53, "la 12a" (la 24a, noktomezo), bone estus, ke en E-to oni uzu komune saman hor-indiksistemon; "narkot(ik)" (kial du radikoj por sama objekto?); "spuro", (G. Spur, postesigno); 91/18 devas teksti: "ne nur tiuj, kiuj ne scipovis naĝi, sed ankaŭ tiuj, kiuj povis, egale perdis...." Kelkaj radikoj ne troveblaj en la pli uzataj vortaroj bezonas noton.—(Robo.)

PRI PAĜO 346.

Pri la ĉefartikolo en la aprila n-ro de "La Suda Kruco" s-ro M. C. Butlér skribas (mi tradukis):—"Pri 'Recenzado' mi konsentas. Tamen eĉ en 'The British Esperantist' fojĝe aperas iom longaj recenzoj se spaco troviĝas por tio. 'Jarmiloj Pasas' estis de mi mem recenzita—ne laŭde. Sed tio estis 'voĉo de krianto en la dezerto.' Recenzo 37-paĝa miapluma pri la Biblio aperis en 'La Kristana Revuo'; restas ankoraŭ la samlonga cetero, kiu ne povis aperi pro la morto de la gazeto."

Ni dankas al s-ro Butler pro lia intereso, sed responde dirus, ke la "iom longaj" recenzoj de "The British Esperantist," cetere tre legindaj, ne konformas kun la ampleksaj kritikaj skriboj, kies maloftecon en nia gazeta literaturo mi kaj aliaj sentas.

La valora studo de s-ro Butler pri la

Biblio estas preskaŭ pure notado de la Zamenhofa lingvouzo kaj ne viciĝas en la kategorion de ĝuste nomitaj "recenzoj."

En la tempo kiam la aprila S.K. artikolo estis skribata, ankoraŭ mi ne ricevis la "Germana Esperantisto," en kiu troviĝas tre bonaj librokritikaĵoj ĉefe de Karl Minor. En la germana lingvo li verkis, inter aliaj, detalan **sespaĝan** studon (marto '32) de la Esp-a traduko de "La Vojo Returne" (Remarque). Jen ekzemplo imitinda por niaj suprajemaj banaluloj. La ok-kolumna kritiko de Nekrasov pri "La Vila Mano" (Bulthuis) en "La Nova Etapo" (Moskvo), malgraŭ ia ideologia koloro, ankaŭ montras la paciencon kaj akraŭvidemon necesajn ĉe tiu, kiu prenas sur sin la taskon taksu fidele kaj laŭmerite la pli gravajn verkojn de la Esp-a literaturo.—(Red.)

TRI GAZETOJ.

Alvenas al ni en la sama tempo la "Espero Katolika," "La Nova Epoko," kaj "La Nova Etapo." Laŭ nia nuna kono la unuenomita estas la plej malnova ankoraŭ aperanta tutesperanta gazeto (28a jaro.) Redaktita en Hispanujo de pastro J. Font Giral, ĝi celas prezenti ĉion, kio povas interesi aŭ informi al la romkatolika Esp-istaro. Ampleksa, bele presita, la jan-februara n-ro enhavas i.a. atentindan artikolon pri "Pio xi kaj Rusujo" kaj "Letero el Hispanujo. Ĉi organo de la Internacia Katolika Unuiĝo E-tista sin nomas monat-aperanta, kaj kostas 30 francajn frankojn (ĉ. 5ŝ.) ĉe Prov. de Gerona, Collell, Hispanujo.

"La Nova Epoko" estas literatura-sciencia organo de la Lanti'a (sennaciula) frakcio de la klasbatala Esp-istaro.

Ilustrita per belaj reproduktaĵoj, la nuna n-ro entenas, krom aliaj bonaĵoj, ĝuindan studon "La Universala Genio de Goethe," artikolon pri la situacio de la verkistoj en Sovetio, kaj konservindan recenzon de "Eterna Bukedo" (Kalocsay) fare de N. Bartelmes. Dumonate; 3ŝ. ĉe R. Lerhner, Kolmstr., 1, Leipzig, Germanl.

"La Nova Etapo" estas literatura-lingvosciencia organo de la Moskva (internaciista) frakcio de la klasbatala Esp-istaro. Tre valora kaj interesa kompilaĵo. "Kritika skizo pri la romanoj de J. Bulthuis"; "Heine kaj Komunismo"; "Genia lingvisto (Zamenhof) venkita de etburgeco" en n-ro 1. La redakcio promesas en venontaj n-roj "Kritika skizo pri la verkoj de Jean Forge" kaj "Kiel Zamenhof ricevis la francan ordenon de honora legio. Neniam publikitaj sekretaj dokumentoj el arĥivo de la rusa carisma polica departemento en la jaro 1905." N. V. Nekrasov, CK SEU. Spiridonovka 15, Moskvo 1. USSR. Abono por 6 kajeroj: 4 mark. germ.

PRI LA JAPAN-CINA AFERO.

La mondopaco estas nun en danĝero pro miskompreno aŭ pli ĝuste pro mal-kono. Jus aperis: LA KONFLIKTOJ EN MANĈURIO (Kaj) SANKTAJO, kun aldono pri la agado de U.H.A. en Ĉinujo. Pg. 60 kun 8 fotoj. Formato 13 x 19 cm. Prezo tre mal-kara—ses pencoj aŭ du resp. kuponoj. Ĉiuj Esp-istoj legu la broŝuron kaj ekposedu la ĝustan konon pri la konfliktoj.

Mendu al UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo; aŭ s-ro K. Nišimura, 1 rue Felix-Faure, Paris (15e).—(Anonco.)

The administration of "La Suda Kruc" invites every non-subscriber receiving this copy to fill in the following, and so aid in guaranteeing regular monthly appearance of the gazette.

SUBSCRIPTION FORM.

I wish to subscribe to "LA SUDA KRUCO" from the month of..... and herewith enclose the sum of 4/6 (New Zealand, 5/-).

Signed.....

Address.....

Date.....

MALMULTE KONATAJ VORTOJ DE ZAMENHOF. (N-ro 2.)

“Se venos iam la tempo, kiam la tuta mondo scios kaj uzos la lingvon Esperanto, tiam—neniu dubos—ni povos kuraĝe diri, ke nia afero absolute atingis la celon. Ju pli multe da homoj ekscias kaj ekuzas nian lingvon, des pli multe ni proksimiĝas al nia celo, des pli multe ni progresas. Sekve la sola efektive vera montrito, ĉu ni progresas aŭ ne—estas la kreskado aŭ nekreskado de la nombro de esperantistoj. Ĉio alia estas nur rimedoj, sed ne faktoj. Se eĉ la tuta mondo bruos pri nia afero, se nia afero brilos en ĉiuj publikaj lokoj, sur ĉiuj ekspozicioj de la mondo k.t.p., sed la nombro de la personoj kiuj ellernas kaj uzas nian lingvon ne kreskos—tiam ni malgraŭ la ŝajna potenco devos diri, ke nia afero mortis, ke ĝia lumo baldaŭ estingiĝos, kiel la lumo de minuta meteoro; sed se eĉ la tuta mondo silentos, se ĉiuj obstine kovros antaŭ ni la okulojn kaj la orelojn, se nia afero longe ankoraŭ restos nekonata en la plej granda parto de la mondo, sed se la nombro de la esperantistoj regule, se eĉ malrapide restados (a). —ni povos kuraĝe diri, ke ni regule progresas, ke ni regule iras antaŭen kaj ke la estonteco apartenas al ni” (Origina Verkaro p. 158/9; el “La Esperantisto,” 1892).

(a) Ĉu ne skribararo por “kreskados”?
(Red. S.K.)

“TUTMONDO KOLEKTANTO”

La sola gazeto por kolektantoj. Redaktas d-ro Jozefo Takacs. Administracio en Jablonne n. Orl., Ĉ.S.R.—Aperas dumonate. Abono 0.40 dolaro aŭ egalvaloro. Specimennumero kontraŭ respondkuponon.

“La Suda Kruco” rekomendas.

MENCIOJ.

“Que es la Esperanto: 16-paĝa folieto koncize, efike klariganta la nunan staton de Esperanto kaj ĝian strukturon, kaj donanta citindajn dirojn de famaj homoj pri la lingvo. Hispanlingva, verkita de Julio Mangada Rose-norn. Presitaj dekdumil, el kiuj disdonitaj dekdumil. Petu al Asociacion Esperantista Espanola, Sagasta 10, Asamblea Suprema de la Cruz Roja, Madrid.

Scienca Gazeto Esperanta: Dumonata gazeto popolscienca. Komparate kun la organo de la Internacia Scienca Asocio Esperantista ĉi tiu usona eldonaĵo montriĝas supraĵeca. La artikoletoj konvene sidus en la tielnomata scienca suplemento (aldonaĵo) de popola sabata taggazeto. Amerika Esperanto-Instituto, Madison, Wisconsin, U.S.

“**Esperantlingva Novelbiblioteko,**” redaktata de Leono Vienano. N-ro 1, “**Eksiĝo,**” el la hebrea originalo de Naum Jeruŝalmi trad. L. Vienano. 40 paĝa kortuŝa rakonto pri la amo de juda lernejservisto al ventkora kuracistino. Lerte verkita, flustile tradukita. Ni salutas aperon de bonaj tekstoj kia estas ĉi tiu sed kial eldoni mizerajn kelkfoliojaĵojn anstataŭ uzi dekon da ili en vere inda libro? Notinda estas “eki” (unue provita de Fiŝer en “La Portreto,” 1911); 37, stranga uzo de “nur” anstataŭ “ĵus” (la knabino nur (ĵus) transpaŝis la sojlon); 9, “sefardaj” bezonas noton; 8, kial “lirioj”? La verko ne estas Italaĵo. Korekten-daj: 12, katedroj (katedroj); 14, “mi ne sukcesos okupi sin” (min); 15, (la) Dia nomo. La tradukinto uzas transitive jen “ordi,” jen “ordigi”; 31 ...kiu daŭris ĉirkaŭ du horoj(n). Ankoraŭ pli da atento estas necesa flanke de la redaktejo, por plene verigi ĝian diron, ke ĝiaj verkoj estas liberaj de lingvaj malĝustaj. Prezo 6p. ĉe N. Szapiro. Warszawa, Nowolipki 8.

KVAKERISMO KAJ PACO

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj Paco por disdoni.

BONVOLE PETU PER ILUSTRITA POŝTKARTO AŬ LETERO.

DR. FRED. J. WILLIAMS,

Samarai, PAPUA.

(fratorganoj afable represu)

La konfliktoj en Manĉurio kaj Ŝanhajoj; pri la agado de la Universala Homama Asocio en Ĉinujo, eldonita de la U.H.A. en Kameoka, Kioto-hu, Japanujo. Ok fotopaĝoj, 50 paĝoj da teksto. Vidu ĉi-numeran anoncon. Porjapana prezento de la ekstrem-orienta demando. Bona Esperanto. Iuloke iom akratona ("Ni ne dubas ke en la proksima estonteco ili (la grand-potencoj) mem spertos ke dankemeco ne ekzistas en Ĉinujo"). Verkita parte de s-ro Jozef Major, kiu lastatempe en siaj skriboj montras senduban "Japanujemon." La dua parto de la broŝuro elspiras malpli naciecan, pli neŭtralan spiriton, kiu strange kontrastas kun la vigla defendemo de la japana vidpunkto karakterizanta la unuajn du artikolojn. Sed eĉ en la dua parto, en kiu troviĝas priskribo pri multa bonfaro flanke de la U.H.A., sonas sur p. 42 disputa noto: "Tie diras la Siberia Homama Asocio: 'Ni kredas, ke kresko de la potenco de via Japanujo...kvietigos la ŝancelige-man politikon de orienta Azio.'" 20 "dekada ĵurnalo" (?); 16 "naturalizigitajn" (nacionigitajn). La citita formo, cetero nenecesa, estas tro sufikshava.—(Robo.)

LA UNUA SUPLEMENTA LEGOLIBRO DE ESPERANTO.

de Kooji Taŝiro.
eld. Esperanto-Kiŝoŝa, Tokio.

Iom mistere la verkinto antaŭparole diras: "Kiam mi pensas pri la sufero de la pasinteco-de mi mem, mi ne povas resti silenta. Tio estas la sola motivo, ke mi verkis tiun ĉi broŝuron." Ĉu li aludas al la teruraj lernaroj, tra kiuj li devis cerbumadi en fremdlingvaj klasoj?

La libreto konsistas el paĝoj da simplaj frazoj, kun konformaj liniitaj blankoj, kiuj permesas la notadon de klarigoj donitaj de la instruisto. Por elementaj ekzamenoj tiu ĉi eldonaĵo bone taŭgas.

P. 24, "la 6a posttagmeze" (kial la E-tistoj ne uzas saman hor-sistemon?); 46, "gardenia-arbo" (?); 52, "historia-lectiono" (for streketon); 88, malbone uzi en lernlibro akuzativon post "ĉe," formon nezamenhofan kaj disputatan. Prezo neindikita.—(Robo.)

PIKANTAĴOJ.

"Ni havas la impreson, ke la Redakcio de 'Literatura Mondo' tro favori-

gas (sic) certajn anglajn verkistojn, kies lingva kapablo kaj literatura talentoj ne meritas tiom da konsiderado. Ni esperas, ke en la estonto ili pravigos la krediton tiel grandanime donitan de nia ĉefa literatura organo."

—J.M., en "Oomoto," Japanujo.

"(La ĵus aperinta) tria parto de la 'Fabeloj de Andersen,' tradukita de Zamenhof, estas sendube bonvena, ĝuste en la momento. kiam multaj verkemuloj, sciantaj aŭ ne la lingvon, rapidegas fabriki librojn."

—"Oomoto Internacia."

SPORTULOJ POR ESPERANTO.

La pola gazeto "Dziennik Bydgoski" donas Esp. anguleton, enhavantan la plej novajn sciigojn el la sportmondo. La gazeto kredas, ke Esp-o fariĝas la estonta internacia sportlingvo, kaj petas eksterlandanojn sendi resumojn de la plej gravaj novaĵoj por represoj. Flankdire, ni petus la gazeton ne uzi "meĉon" (konkurso, konkuro) sence de la angla "match," sporttermino. Adresu: Scienca Esperanta Rondo, Bydgoszcz, Poland.

UKRANIO ANTAŬEN!

Jam kelkfoje la ukrania Centrasindikata direktivo helpis al la Esperanto-laboro. La 10 septembro la tutukrania sindikato decidis sisteme akceli lernadon de la internacia lingvo. La plano 1931/2 montras jenan ciferon pri Esp-lernantoj enregistritaj: en rondo kaj kursoj 10,000, radio 2,000, korespondaj kursoj 1,000, perfektigaj radi-kursoj 1,000, entute 14,000! Esperanto per tio konsistigas 25 procenton de la sindikata lingvokursaro.

(El Arbeiter-Esperantist)

BONE!

En la jara kunveno de akciuoj de la Akcia Societo "Centra Esperanto Librejo" en Hago (Nederlando), la 27an de Februaro, la bilanco kaj la konto de perdoj kaj profitoj estis aprobataj kaj la dividendo pri 1931 fiksata je 7% (kiel antaŭan jaron).

La kunveno decidis donaci 102.53 guldenojn al la komitato por la starigo de la Zamenhofa monumento en Bjalistok (Polujo). (Proks. £7/10/-.)

SIDNEJA ESPERANTA SOCIETO.

Ĉe la jarkunveno de la societo la 30an de junio ĉefaj oficistoj estis elektitaj por 1932-33:—Prez., s-ro A. W. Peacock (S.A., U.E.A.); vic-prez., s-ro T. Perry kaj s-ino J. G. Mair (vic-del. U.E.A.); sek-io, s-ro L. E. Pfahl (del. U.E.A.); helpsek-io, s-ro L. Hiller; kasisto, s-ro H. Davies (U.E.A.); kontrolanto, s-ro V. Rutland (U.E.A.) kaj bibliotekisto, f-ino F. Smith (U.E.A.).

La prezidanto, leginte sian raporton pri la funkcie de la societo dum 1931-32, diris, ke malgraŭ forte malhelpanta monmanko estas konstatabla progreso. Jam starigis filioj aŭ grupoj ĉe Peter-sham, Parramatta, Punchbowl, Redfern kaj Waverly. Leteroj el kelkaj enlandaj lokoj montris, ke granda intereso tie floras pri la E. movado. La publikaj instruparoladoj ankoraŭ daŭros dum la nuna jaro. Pri tio ni baldaŭ informos pli precize. La nove elektitaj esprimis sian intencon neniel malpene-miĝi dum sia oficeno. Vivu E-to!

—A. W. Peacock (Prez. S.E.S.)

Melburno, Vic.—La 28an de Junio, kelke da anoj de la Melb. Esperanto Societo sidis por la B.E.A. ekzamenoj.

Je la 4a de Julio la jarkunveno de la Societo okazis, kaj la oficistoj elektitaj por la sekvonta jaro estas jene: Prez., s-ro P. Hudson; Vic-Prez-oj, s-ro C. W. Ballard, kaj f-ino H. Bostock; Sek-io, f-ino L. Irwin; Kasisto, s-ro E. Cox (re-elektita); Bibliotekisto, f-ino V. Cox.

La pasintjara bilanco montris, ke la financa stato de la Societo sufiĉe kontentigas. La prezidanto, s-ro P. Holmes, proponis dankesprimon de la klubo al f-ino Cox, pro ŝia bona servo al la Societo dum kelke da jaroj kiel sekretariino. S-roj Ballard kaj Hudson kore subtenis la proponon, al kiu f-ino Cox taŭge respondis.

La Melb. Klubo elsendis alvokon "Venu al la Frenezaĵoj" je la 29a de Junio. Staris sur la programo rusa danco, "tragedia" prezentaĵo kaj aliaj ridindaj eroj. Kiel kutime la ĉeestantaro pasigis feliĉan vesperon.

Is there a blue or red cross on your wrapper?

Westralian Esperanto Society, Perth. W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikadojn al la sekretario.

Masterton Esperanto Club — Meet every Tuesday at 8 p.m. in the Y.M.C.A., Church-st., Masterton. Hon. President, Mr. G. R. Sykes, M.P.; President, Mr. A. Dewar D.B.E.A.; Vice-Presidents, Mrs. McNab and Mr. B. Johns; Secretary, Mr. Howard Franks, 38 Workop-rd. Visitors always welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikadojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretariino, f-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18^a horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. E. C. Jack; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.